

VROCLAVO

Vroclavo estas belega urbo kun riĉa historio kaj neordinara aspekto. La urbo situas apud la Sudeta montaro, meze de Silezia malaltaĵo, ĉe la Odro-rivero en sudokcidenta Pollando.

Vroclavo estas grava fervoja nodo de Pollando, ĉar el ĝi iras multaj linioj en jenaj direktoj: Leszno – Poznań, Opole – Katowice – Krakovo, Opole – Lubliniec – Częstochowa, Legnica – Zgorzelec, Głogów – Zielona Góra, Kłodzko – Kudowa-Zdrój, Kłodzko – Międzyzlesie, Wałbrzych – Jelenia Góra, Oleśnica – Ostrów – Łódź – Varsovio.

Ĝi estas kvara la plej granda urbo de Pollando kaj nombras ĉirkaŭ 650 000 da loĝantoj. Vroclavo estas grava centro de scienco kaj kulturo. En Vroclavo funkcias 13 superaj lernejoj inkluzive de universitato kaj politekniko, multaj institutoj kaj laborejoj de la Pola Sciencakademio.



Vroclava Universitato – ekstere kaj interne (Aula Leopoldina)

Vizitantoj de Vroclavo memoras ĝin antaŭ ĉio kiel vigla centro de kulturo. En multaj teatroj, operejo, muzika teatro, filharmonio, kluboj, muzeoj, galerioj okazas multaj artistaj eventoj. La kultura allogaĵo estas Bildpanoramo de Raĉawice, unu el dekelkaj panoramaj pentraĵoj konservitaj en la mondo.

Vroclavo estas plena de verdaj terenoj (ĉirkaŭ 3600 hektaroj) kaj en tio 24 hektarojn okupas parkoj. La plej vizitindaj situoj en la centro de la urbo estas: Parko Szczytnicki (Ŝĉitnicki) kun terenoj ĉe la Halo de Jarcento, Besta Ĝardeno kaj Botanika Ĝardeno.



Botanika Ĝardeno



Zoologia Ĝardeno

Vroclavon tranĉas multaj alfluejoj de rivero Odro kaj kanaloj. Ĝi estas eksterordinara urbo de 12 insuloj kaj 112 pontoj.



Urboplaco je areo de 3,6 hektaroj konservis sian spaco-sistemon de la dua duono de XIII-a jarcento. Apartenas al unu el la plej grandaj en Eŭropo.

Ĉirkaŭ la urboplaco staras sesdek brikdomoj je renesanca, baroka kaj klasika stiloj. Meze de la placo grupiĝas konstruaĵoj kun plej grava kaj grandioza gotika-renesanca urbodomo el XIV-XVI-a jarcento, perlo de sekulara arĥitekturo kun belega internaĵo.

Insulo Tumski estas la plej malnova enloĝata parto de la urbo. Jam en la IX-X-a jarcentoj ekzistis ĉi tie fortikigita princa kastelo kun vasta suburbo. Post la transigo de la kastelo en maldekstran bordon de Odro, sur la Insulo Tumski en la jaro 1000 oni konstruis la unuan katedralon de Sankta Johano la Baptisto kaj poste en la XIV-XVI-a jarcentoj vicon da sakralaj objektoj. Insulo Tumski estiĝis



la centro de ekleziaj aŭtoritatoj. En la XIX-a jc. oni superŝutis malnovan fluejon de Odro, tial Insulo Tumski ĉesis ekzisti kiel la insulo, sed la nomo restis. La nuna Insulo Tumski estas unu el multaj turistaj atrakcioj de Vroclavo kaj ŝatata promenloko de vroclavanoj.

Aliaj allogaĵoj de la urbo:

Japano Ĝardeno

Vroclava Multimedia Fontano

Malnova juda tombejo <http://www.kirkuty.xip.pl/wroclawslezna.htm>

Multnombraj muzeoj: Nacia, Urba, Geologia, Naturscienca, Arsenalo, Universitata, Muzeo de Sinjoro Tadeo, *Hydropolis*, Arkitektura, de Modernarta, Pavilono de Kvar Kupoloj, Poŝta kaj Telekomunika, Centro de Historio „Zajezdnia” („Remizo”) kaj...

speciale por fervojistoj

Kolejkowo (Trajnetejo) - mirakla miniatura mondo
(La plej granda fervoja miniaturo en Pollando)



Pli multe pri Vroclavo kaj Esperanto en Vroclavo vi povas tralegi en Vikipedio <https://eo.wikipedia.org/wiki/Vroclavo>